WIKIPEDIA

Srana lingvo

Srana lingvo (***Sranan tongo*** ankaŭ *Sranantongo* aŭ mallonge *Sranan*) estas la ĉefe parolata lingvo de Surinamo. Precipe antaŭe oni neformale diris *taki taki*, sed tiu nomo nuntempe estas konsiderata kiel malestima. Sranan estas la lingua franca de Surinamo, larĝe disvastigita kontaktlingvo, kaj per tio kreola lingvo, kiu en la ĉiutaga vivo estas uzata de preskaŭ ĉiuj grupoj de la loĝantaro. Takso el 1997 donis 300 000 parolantojn, aŭ 80% de la loĝantaro de Surinamo. Alia konata surinama lingvo estas Sarnami kiu antaŭ ĉio estas parolata de homoj kiuj devenas el Hindio. La oficiala lingvo de Surinamo estas tiu de la antaŭa koloniisto nome la nederlanda.

Sranan tongo estas kreola lingvo, miksita lingvo, kreita el la neceso interagi inter si por povi komuniki. Sranan tongo estiĝis inter la sklavoj, kiuj laboris sur la plantejoj dum la nederlanda kolonia regado en Surinamo. En la lingvo ankoraŭ retroveblas spurojn el la angla, nederlanda, hispana, portugala kaj okcidentafrikaj lingvoj. La simpla lingvo kiu tiel estiĝis estas unualoke piĝin-lingvo. Se la lingvo poste disvolviĝas pli kaj pli kaj estas pludonata ankaŭ al infanoj kiel gepatra lingvo, ĝi estas kreola lingvo.

Ekzemploj kun la verbo 'wroko' (labori)

mi e wroko (m'e wroko)	mi laboras
yu ben e wroko	vi laboris
a ben wroko (kaba)	li (jam) laboris
a mu wroko	li devas labori
wi ben wroko	ni laboris
unu sa/o wroko	vi (plurale) laboros
den ben o (b'o) wroko	ili laborus

- Fa waka? = Kiel vi fartas?
- Numeraloj:

wan (1), tu (2), dri (3), fo (4), feyfi (5), siksi (6), seybi (7), ayti (8), neygi (9), tin (10)

Eksteraj ligiloj

- Pri Srana lingvo (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=srn) en Ethnologue (angle) angle

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Srana_lingvo&oldid=6445610"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:27, 26 okt. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.